# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 19/05/2022 Kvincentokdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 734,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 300,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 176,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 156,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 102,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde 2022 ?? ???)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



la [esperanta retradio](#)



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

**EKDE MEZA AĜO SEP-HORA DORMADO ESTAS PLEJ BONA** 7A MAJO 2022

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**

**Numero 15 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kiom da literoj estas en la Esperanta alfabeto? Respondu parkere!.
2). Kiuj estas la vokaloj en la esperanta alfabeto?
3), Kiu frazparto estas "al Parizo" en la frazo "La vagonaro al Parizo"?
4). Kiu frazparto estas "al Parizo" en la frazo "Morgaŭ ni vojaĝos al Parizo".
5). Kiu frazparto estas "en la ĝardeno" en la propozicio "La infanoj en la ĝardeno ludas"?
6). Ĉu en Esperanto la vorto "ĉar" estas konjunkcio aŭ subjunkcio?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 583 *Marcel Leereveld.*

# Mi deziras Pacon kaj mi do estas Eperantisto

Nun ekestas milito ~~Monda Milito 3~~ inter Rusujo kaj ~~la okcidenta mondo~~ Ukrainujo
Ĉar la okcidenta novaĵo lerte donas la okcidentan flankon de la novaĵo, mi donas la aliflankon por ke vi mem decidu kiuj diras la veron, aŭ duan veron, aŭ mensogas.
Se mi havas ligon mi enmetas ĝin, por sciigi al vi ke ne estas sole miaj pensoj *Roger Springer*
Novaĵo de aŭstraliaj esperantaj kluboj havas prioritaton kiam oni sendas al mi klubinformojn.

## Papo Francisko sugestas, ke la "bojado de NATO ĉe la pordo de Rusujo" eble devigis Putinon invadi Ukrainujon.

https://www.msn.com/en-au/news/world/pope-francis-blames-the-victim-in-russia-ukraine-war/ar-AAX2BUh?ocid=winp1taskbar&cvid=0817fa15192e401387a3f44fca184f55




Elektu misilojn aŭ beban manĝaĵon *Roger Springer*

## La nuna voĉdono en Aŭstralio povus malhelpi la 3an mondmiliton.

## MILITOJ ESTAS KRIMOJ KONTRAŬ HOMOJ, BESTOJ KAJ NATURO

# Ĉu vi voĉdonus por MILITO aŭ PACO?

Mi metos la MILIT-partiojn la LASTaj en la baloto de la 21a de majo 2022
La ĉefministro sole povas iniciati militon kaj li/ŝi estas elektita de la sukcesa partio ne la Aŭstraliaj Balotantoj. Viaj elektitaj kandikatoj decidos kiu estos la ĉefministro

Tial kontraŭmilitaj balotantoj nur povas voĉdoni por la kontraŭmilitaj kandidatoj de Civitana Partio kaj Socialista Egaleca Partio nur se ili estas sur la balotilo, aŭ por sendependaj kandidatoj se ili ne estas sur la balotilo.

Meti la ĉefajn militpartiojn absolute la lastaj en la baloto por malhelpi WW3 estas multe pli grava ol iuj aliaj subaĉetaĵoj, kiujn oni proponas por esti elektitaj. *Roger Springer*

## Pri novaĵo el https://www.greanvillepost.com/



Mi rimarkas, ke denove la iam bonega kaj nepolitika bulteno de AE uzis senĝene por-rusa kaj por Ĉinio, t.e. KPĈ, ne la demokratia Tajvano, interretan fonton por publikigi ligilon al kontraŭusona artikolo. En ĉi tiu peco de kontraŭ-Ukrainio, kiu, kiel ni ĉiuj scias, voĉdonis por la demokratie elektita Prezidanto, male al la du diktatoroj en Rusio kaj Ĉinio, el kiuj unu emas venenigi aŭ pafmortigi siajn kontraŭulojn sur la pontoj de Moskvo, oni diras ke Usono ne havas kialon partopreni en la rusa murda atako kontraŭ la paca lando Ukrainio. Uzante la idiotan rezonadon malantaŭ tiu ĉi pozicio, oni povus argumenti, ke Britujo ne havis rajton interveni en la naziaj atakoj kontraŭ Eŭropo en 1939. Evidente, Britujo devus permesi al Hitler (la versio de 1939 de Putin) ambaŭ havis/havas la manon tremantan, (kvankam tiu de Hitler estis lia maldekstro kaj Putin lia dekstro) por daŭrigi sian murdan regadon kontraŭ la judoj (kiujn la maldekstro amas ataki...vidu nur la Brita Laborista Partio), samseksemuloj, ciganoj, handikapitaj viroj, virinoj kaj infanoj. Ĉu Britio devus ĉesi liveri armilojn al la rezistaj batalantoj? Ho, ĉu ne provizu al USSR helpon por helpi ilin? Kio okazas se Putin, kies tuta deziro estas rekrei Sovetujon, aŭ detrui sian landon antaŭ ol li mortos, atakas Moldavion, Finnlandon, Svedion? Ĉu la CIVILIZITA mondo permesas al li fari ĉi tion? Nuntempe ni havas la sufiĉe senutilan armeon de Rusio seksperfortanta, torturanta kaj murdanta ukrainajn civitanojn. Ili bombas lernejojn, hospitalojn kaj faras krimojn kontraŭ la homaro. Kaj okazas kidnapo de ukrainaj civitanoj kaj forigo de ili al Rusio. Kial la AE NE raportas aŭ kondamnas ĉi tiujn barbarajn agojn aŭ similajn barbarajn agojn de la KPĈ: malvolaj steriligoj, uzado de kaptitoj por organdonacoj, ekzekutoj, la atakoj kontraŭ demokratio en Honkongo kaj kompreneble la murdoj de studentoj en la placo Tiananmen? *Gordon Coleman*

https://thesaker.is/gonzalo-lira-the-pentagon-says-russia-no-but-china-yes/

NATO jam malŝparis 50 miliardojn da dolaroj - kaj kalkulante - dum la rusoj elspezis 4 miliardojn da dolaroj, pli/malpli, kaj gajnis landon ktp Kiu vere venkas? *Roger Springer*

Karaj Amikoj Mi kredas ke estas du flankoj de ĉiuj konfliktoj. Mi sidas en mia malgranda oficejo kaj la novaĵo de la mondo envenis al mi per medio plej parte kontrolita de Usono SED malofte estas fontoj el la aliaj partoj de la mondo. Ne la sama? Kiuj mensogas?
Por ĉio, kion mi metas en AE mi ĉiam montris ligon por ke vi povu kredi aŭ ne.
Mi opinias ke kontraŭa novaĵo plibonigas vian pensmanieron kaj forigas iom da malamo.
Malamo manĝigas Militon. Mi nur deziras pacon.
Mi pardonpetas al la legantoj kiuj havas alian kredon pri la vero. Sendu al mi la artikolojn kiuj kontraŭas miajn kredojn sed ne novaĵon el la okcidenta medio. Tage ĝi donas al mi la veron??

Ĉar mi vivis en Ĉinujo dum pli ol unu jaro, mi ne kredas multe de la propagando pri Ĉinujo.
Mi ne povas kompreni kial Esperantistoj povas igori la nunan mondmiliton 3 inter la okcidentaj politikaj landoj kaj Rusujo. Eble ĉar la propaganda maŝino treege efektive unuflankigas vin




## SOLVOJ DE LA KVIZETO

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



1). 28.
2). Ili estas: a; e; i; o; u; (kaj la diftongoj "aŭ" kaj "eŭ").
3). Suplemento.
4), Adjekto.
5). Suplemento. Ĝi povas esti Adjekto, sed tia uzo estas evitinda.
6). Prefere Subjunkcio, kvankam kelkaj homoj nomas ĝin Konjunkcio.

*Marcel Leereveld*



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 21a de majo estos la tria sabato Venu!

*Roger Springer*

**3ZZZ**...La 16an de majo 2022 la Esperanto programo en 3ZZZ elsendis anoncojn , kiuj povas interesi kantemulojn kaj sciensistojn,informojn pri la historio de la esperanta Movado : Ido kaj la sekvoj ( el la prelego de Trevor Steele) la inicianto de literatura kritiko en Esperanto Lajos Tárkony, vidpunkton pri la evoluo de Kubo kaj studojn pri la konsekvencoj de Kovid-19 .
....

*Franciska Toubale*

## Sandor kaj Helen renkontas la ĉarman Esperanto-grupon en Kanbero.



.. ankaŭ la longdaŭran esperantiston Huigh Malcolm, kiu nun loĝas en maljunulejo.



Multajn dankojn al Caitlin, Giles kaj Steven, kiuj organizis la viziton 14/05/2022 *Sandor Horvath*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



# ĈU TUTA EŬROPO ESTAS KAPITALISMA ?

**FRANCISKAĴO.**

Antaŭ kelkaj semajnoj Franciska proponis, ke eble plej bonas esti lando kun kapitalisma sistemo kaj samtempe kun senprofita sistemo. Ŝi menciis iam vivi en tia lando (en Norda Afriko).

Unue ŝia propono validas nur, se la kvanto de kapitalismemuloj kaj de senprofituloj sufiĉe egalas. Kaj tio ne ofte okazas nuntempe. Eble plu en Norda Afriko, kaj ankaŭ en partoj de Suda Afriko. Kaj en provincoj de Hindujo. Kaj eble en Albanujo.

En tiaj kazoj de Franciska la kristanoj vendas kun kaj por fari profiton, kio rezultas en pliriĉiĝon de certaj personoj kaj komercoj, kaj do en malriĉecon de aliaj. Kaj la alia duono de la enloĝantoj komercas, ŝanĝas varojn kaj servojn, kie la homoj ne faras profitojn. Tio okazas ekzemple ĉe la islama eklezio, sed ankaŭ ĉe la marksismo. Ĉe la marksismo tio rezultigas, intence, ke ĉiuj civitanoj posedu la saman riĉecon, kaj ĉe la islamanoj ke la riĉeco, kaj la potenco, de la membroj ne ŝanĝiĝu. Se la neislamanoj estus preskaŭ ĉiuj marksistoj, en la lando ne ekzistus profitoj, nur samvalora interŝanĝado. Mi ne konas tian landon, sed praktike ĝi eblas, kiel ekzemple en antaŭaj portugalaj kolonioj. Kutime, en kazoj kie komenciĝas marksisma sistemo, tuj la usona registaro malaperigas ĝin perforte.

Ni havas tamen ekzemplon de preskaŭ-marksisma lando, nome Norvegujo. Tie la marksisma egaleco estas tiom serioze kaj rigide praktikata, ke ĉiuj civitanoj povas scii la posedon de ĉiu alia civitano. Ekzemple ĉiu domo devas anonci sur la ekstera pordo, kiom tiumomente la enloĝantoj finance posedas, kio ne povas esti multe diferenca de la aliaj domoj. Kelkaj homoj ne ŝatas tion, ĉar ili volas posedi pli ol la aliaj civitanoj, sed tio estas la nacia leĝo.

La sistemo estas "preskaŭ-marksisma" ĉar eksterlandanoj ne bezonas obei ĝin.

*Marcel Leereveld.*

 Sur la operacia tablo mezaĝa sinjorino spertis preskaŭ morton. Ŝi demandis Dion, ĉu tio ĉi estas la fino. Dio rakontis al ŝi, ke ŝi havas ankoraŭ 29 jarojn sur la Tero.

Resaniĝinte la virino decidis ĝui la restantajn multajn jarojn de sia vivo. Ŝi do ŝanĝis sian aspekton per vizaĝaj operacioj, perdado de ekstra graso ĉirkaŭ la stomako, ktp. kaj ankaŭ enplantado de novaj kaj pli grandaj mamoj. Kiam estis tempo por forlasi la plibeligejon ŝi ĝoje staris ekster la plibeligejo atendante taksion. Tiam subite okazis fulmotondro kaj fulmo atakis kaj tuj mortigis ŝin.

Renkontinte Dion ŝi furioze demandis Lin, "Kial vi diris al mi, ke mi havas ankoraŭ 29 jarojn da vivado? Kio okazis?"

"Mi petas vian pardonon, respondis Dio, sed mi tute ne povis rekoni vin!"



*Bob Felby*